

Laŭokaza Novaĵletero.

Organo de la

Internacia
Komerca kaj Ekonomia
Fakgrupo.

P.O. Kesto 25041,
3001HA Rotterdam,
Nederlando.

Numero 5;

aprilo, 1985.

La utilo de reklamanoncoj por Esperanto,

de Franz Josef Braun.

Ĉu vi ankoraŭ memoras? En nia Novaĵletero n-ro 2 de oktobro, 1984, troviĝas sur paĝoj 7 kaj 8 niaj proponoj por agadprogramo de nia Fakgrupo. En la sama Novaĵletero, en miaj 'Pensoj pri la neceso por Esperantista komerca fakgrupo', mi atentigis pri tio, ke ni koncentru niajn rarajn fortojn al "tiaj aktivecoj, kiuj promesas la plej altan efikon, tio estas, la plej grandan atenton kaj la plej nombran alparolon al homoj decidaj kaj influhavaj por nia afero".

Unu tre grava aktiveco ne estas citita en tiu programo, ĉar ĝi aperis en nia penso nur poste, sed tamen ĝi estas eble la plej grava: Esperantaj reklamanoncoj.

Vi scias, ke ni interkonsentis kun la redaktoro de la revuo MONATO, ke ĉi tiu revuo estu la podio por la publika laboro de nia fakgrupo. Tial, ni volas varbi kaj havigi tiajn reklamanoncojn de entreprenoj favore al MONATO.

La unua tia reklamanonco, ricevita de la firmao BOSCH far mi, aperis en la marta kajero de MONATO. Por pliaj mi havas promesojn de aliaj entreprenoj germanaj.

Reklamado apartenas al la moderna vivo. Per ĝi oni financis la olimpikajn ludojn, 1984, en Los-Angeleso, (kaj oni eĉ spertis profiton ĉe tio). Mi ofte havas la impreson, ke en la E.-Movado la fortoj 'mono', 'kapitalo', 'profito' kaj tiel plu, pro ilia kapitalisma odoro ne estas ŝatataj,

kvazaŭ ili estus kondamnitaj aŭ diablaj. Ĝuste tio ĉi kaŭzas, miaopinie, unu el la ĉefaj malhelpoj por tio, ke la internacia lingvo nur tiel malrapide progresas kaj disvastiĝas: la manko de mono, sentebla en ĉiuj Esperantistaj organizaĵoj!

Ni ekonomiistoj sentu nin destinitaj elmondigi tiun tute malĝustan ĝeneralan sintenon!

Niaj profundaj pripensoj evidentiĝis, ke reklamanoncoj havigitaj al MONATO alportas multoblan utilon:

1. MONATO ricevas kromajn enspezojn, kiuj helpas sekurigi la financon bazon por ĉi tiu bona E.-revuo, kaj eĉ ebligas, ke MONATO fariĝu pli informriĉa, pli belaspekta sed tamen ne pli multekosta; entute pli leginda.

2. Nia Fakgrupo ricevas de MONATO kurtaĝon je 15 procento de la anoncoprezos. Tio plisaniĝas la staton de la fakgrupa kaso, kaj permesas al ni pensi pri prestiĝaj pliaj agadoj.

3. La tradukanto de la anonco estas devigata traduki la reklamon en la koncerna nacia lingvo en la ĝusta senco en Esperanton. Tio estas tute alia afero, sed tamen tre utila ekzerco por la tradukanto. Ĉe tio estas kreataj novaj fakterminoj.

4. En la firmaoj pretaj al reklamado ni kontaktas kun personoj, kiuj unuafoje aŭdas aŭ vidas la internacian lingvon. Tio povas esti almenaŭ grava helpo por

Resume: la reklamanonco estas la plej utila farado, jen por MONATO, jen por la tuta Esperanto-Movado.

Kiel oni sintenu por gajni mendo(j)n pri reklamanoncoj, por MONATO?

Jen miaj spertoj kaj sintenproponoj en tiu kampo:

a. Taŭgaj por reklamanoncoj por MONATO estas nur tiuj entreprenoj, kiuj surmerkatas produktojn internacie vendatajn la 'finkonsumanto'. Necesas elserĉi tiajn entreprenojn en via ĉirkaŭaĵo.

b. Se eblas, efektivigu la unuan kontakton kun la reklamsekcio de la koncerna entrepreno pere de konatulo via kiu estas samtempe konato de tiu sekcio. Tamen, vi povas ankaŭ rekte alparoli ŝin aŭ lin, en kazoj de manko de tia helpo.

c. Ĉe la unua via vizito kaj prezento de via deziro, vi verŝajne estigas miron ĉe ŝi aŭ li, ĉar ŝili neniam aŭdis aŭ detale eksciis ion pri Esperanto, kaj aparte se ŝili ne povas imagi, ke Esperanto taŭgas por reklamanoncoj. Nun vi povas pruvi vian konvinkigoforton.

ĉ. Estas bone, se vi montras al tiu sekcio kelkajn Esp.-gazetojn. Rekomendindaj estas la revuo de via landa E.-asocio, la revuo El Popola Ĉinio, (pro ĝiaj belegaj kolorfotajoj), kaj nunre MONATO, kun iu ĵus aperinta reklamanonco, (ekz.: la marta kajero kun la BOSCH-anonco).

Lasu krome koncizan priskribon pri la i.l. en via nacia lingvo, (ekz-o germanlingve: 'Esperanto im Fluge' de Esperanto-Centro, Paderborn).

Rimarko: unue la reklamsekcioj vizititaj de mi estis tiel entuziasmigita, ke li tuj havis la elstaran ideon, post apero montri la anoncon en la entreprena gazeto, indikante, ke unuafoje okazis reklamo por siaj produktoj en la internacia lingvo, Esperanto.

d. Necesas, ke vi montru la tariffolion de MONATO. Unu tutpaga anonco kostas 595 germanajn markojn, kion juĝos via alvidulo tre modesta. Al la dandando nun estiganta pri la eldonkvanto, vi devas laŭvere nomi la (ankoraŭ) malgrandan kvanton de pli-malpli 2000 abonantoj, sed vi tamen menciuj, ke efektive la revuo cirkulas en Esperantistaj grupoj kaj rondoj, kaj tiel atingas pli grandan nombron de legantoj. Entute, vi devas emfazi, ke tia anonco ne estas donaco; ĝi alportos novajn aĉetontojn por la produktoj kaj tiel donas profiton.

e. Por certigi al tiu sekcio pri ĝusta traduko, povas esti rekomendinde deklaru vin preta kontroligi vian tradukon far alia konata Esperantisto. Vi tamen entute sintenu fiera, memkonfida kaj konvinkita pri la progreso de Esperanto!

Mi deziras por vi multe da sukceso, kaj do riĉan rikolton de reklamanoncoj por MONATO, kaj agrablaj sekvoj por la Fakgrupo.

Franz J. Braun.

-----o00o-----
Ne-fermita letero de la Prezidanto:

Alvoko al kunlaboro.

Karaj samideanoj!

Ekde la mezo de 1984, ekzistas nun nia Komerca Fakgrupo, (intertempe: Internacia Komerca kaj Ekonomia Fakgrupo, IKEF), ja ankoraŭ ne oficiale fondita sed tamen ĝi ekis sian laboron.

Ĝis nun aliĝis la rimarkinda

numero de 21 membroj el 15 landoj, kiuj devus kapabli antaŭenpuŝi nian aferon. En la persono de S-ro Lawrence Mee ni disponas pri kaj vere lerta kaj sperta Esperantisto kun bonegaj kontaktoj kun UEA, kaj agema, sinofera Ĝenerala Sekretario. Estis li, kiu kreis kaj redaktas nian nunan informilon

por la membraro, la Laŭokaza-n Novaĵletero-n, sendube iom modesta, sed konsiderante ĉiun komencan malforton tamen realtive impona organo. En tiu grado, en kiu nia agado pligrandiĝus, ni facile povus pliriĉigi, plibeligi aŭ nove formi tiun informilon.

Ankaŭ ne forgesu, ke ni interkonsentis kun la revuo, MONATO, (Revuo pri kulturo, politiko kaj ekonomio), ke ni uzu ĝin kiel podion, tribunon kaj katedron por nia laboro. Mi rajtas aserti al vi, ke nia fakgrupo tie estas bonvenega, ĉar ni plenigas en MONATO la 'ekonomian truon'.

Do mi opinias, ke aktuale estas bonege preparita la kampo por utila kaj fruktodona laboro.

Sed kio ankoraŭ mankas? -- La vere aktivaj kaj diligente kunlaborantaj membroj mankas!!

Tute ne sufiĉas, ke vi pagu vian kotizon de 20 guldenoj kaj poste ripozu en via fotleo pensante, ke la kamaradoj Braun kaj Mee entreprenos ĉiun necesan laboron. Ne, ne! Tio efektive estus tro malmulte.

Fakgrupo kiel la nia povas vivi kaj precipe postvivi nur per flama kaj aktiva kunlaborado de siaj membroj. La kotizon oni bezonas por kovri la kostojn de la administrado. Sed sole el tio ne ekestas efika fakgrupa laboro.

Kun granda bedaŭro ni devis konstati dum la lastaj monatoj, ke al la artikoloj en la Laŭokazaj Novaĵleteroj alvenis preskaŭ nenaj reagoj de vi, eĉ tiam ne, kiam la redaktoro petis vin esprimi vian opinion priiu tie prezentita konkreta problemo aŭ propono.

Tiamaniere, karaj gesamideanoj, ni ne plu povas daŭrigi; alikaze nia fakgrupo estos 'morte naskita infano'. Tio estas tre domaĝa kaj certe ankaŭ bedaŭrinda perdo por la E.-Movado. Mi rifuzas akcepti la pretekston, ke iu nia membro ne havas tempon por la kunlaborado. Mi mem laboras en industria entrepreno sur respondeca posteno minimume 50 horojn semajne; mi mem havas domon kun

ĉardeno, kiuj volas esti prizorgataj. Tamen mi sukcesas 'forŝteli' kelkajn horojn por la ŝatata hobbio, Esperanto. Tial mi firme asertas, ke ankaŭ vi havus iom da tempo por kunlaboro, difference de unu el vi al alia, se vi efektive celus al tio.

Mi supozas, ke vi ĉiuj estas konvinkitaj kun mi, ke nia bela i.l., Esperanto, povas disvastiĝi en la mondo nur se ni, la Esperantistoj, kontribuas al ĝi per iom da oferema laboro -- pli ĝuste: memĝojiga okupo.

Mi plue supozas, ke vi, fariĝinte membro en nia fakgrupo, ankaŭ havas plezuron kultivi la kampon elektitan. Nia fakgrupo celas al la okupo de la kampo, ekonomio / komerco; gravega kampo, do, kaj ĝis nun malmulte prikultivita.

Interesa laboro kun alta probableco de sukceso staras antaŭ ni. Ek al ĝi !!

Tial mi petegas vin, karajn gesamideanojn de nia fakgrupo: Estu pretaj kunlabori! Reagu al niaj demandoj kaj alvokoj pri iu temo en la Laŭokazaj Novaĵleteroj! Estu preta transpreni ian eĉ malgrandan taskon el la gamo de nia agadplano! Abonu la revuon MONATO, se tio finance ablas al vi; vi povas mem gajni la abonkostojn per artikoloj verkitaj de vi por MONATO; MONATO ja serĉas internaciajn aŭtorojn pri komerco, ekonomio kaj ekonomia scienco.

Fine, mi esperas, ke vi bone komprenas min en mia zorgo pri la pluekzistado de nia fakgrupo; ke vi ne sentas vin persone ofendita per miaj 'klaraj vortoj'. Vi ja scias, ke la oficiala fondkunveno okazos dum la ĉi-jara UK en Aŭgsburgo, (la 3-a ĝis la 10-a de aŭgusto). Estus tre dezirinde, ke vi ĉiuj, aŭ almenaŭ la plimulto inter vi, havos la eblecon partopreni tiun - espereble - elstaran eventon, kaj ke tiam ni persone interkonatiĝos.

Kun tiu daŭra espero mia, kore saltuas vin, amike via,

Franz J. Braun.

La financa kaj administra raporto pri 1984.

Tiu ĉi raporto temas pri la duono da jaro ekde komenciĝo de nia aktiveco, komence de julio; estonte la administra jaro estos ĉiam la kalendarajaro.

Ĉi-kune troviĝas kaj la Spezokonto por la (duona) jaro, kaj la Bilanco por la lasta tago de la jaro; ambaŭkaze, la ciferoj estas rondigitaj al la apuda guldeno.

La librotenado okazis en Roterdamo laŭ la klasika metodo kaj tute en Esperanto; D-ro Polerani en Milano konsentis esti Revizoro, kaj surbaze de fotokopioj de la koncernaj dokumentoj, li aprobis ambaŭ raportojn.

La plej evidenta fakto el la ciferoj de la Spezokonto estas la malgajno por la jaro, en sumo tiel granda, ke ni devis transporti negativan kapitalon al la nova jaro. Dek ses membroj pagis la duonigitan kotizon por la duono de la jaro, kaj krome faris malavaraĵajn donacojn.

La ĉefaj eroj de elspezoj estas la kostoj de tri Novajletero kaj ĝenerala afranko. Ni deskribis sesonon de la starigaj kostoj konforme al la anoncita plano deskribi la tuton en la daŭro de tri jaroj, kaj dekonon de la (nominala) valoro de libroj donitaj por starigi bibliotekon. Notinde estas, ke cent dudek guldenoj estas pagataj, nete de ŝtata imposto al Mondk. Eld. Esp., (la entrepreno de la Kasisto), pro servoj kaj materialoj bezonataj dum preparado de la Novajleteroj.

Ni esprimas dankojn al membroj kiuj ebligis la starigon de la Fakgrupo, kaj aparte dankon tiujn, kiuj faris antaŭpagon de kotizo por estontaj jaroj; ne eblas imagi pli bonan metodon esprimi fidon en la estonteco de niaj laboroj.

Roterdamo, je
marto, 1985.

Lawrence Mee,
Kasisto.

SPEZOKONTO por la (duona) jaro.

<u>Kostoj</u>		<u>Rimedo</u>	<u>oj</u>
Ĝeneralaj kostoj (inkl. de deprezoj)	48	Membro-kotizoj	160
Kostoj de materialoj	73	Donacoj kaj krompagoj	146
Afranko ĝenerala	137	Gajno pro peradvendoj	10
Novajleteroj en tuto	<u>284</u>	MALGAJNO por la jaro	<u>226</u>
sumo de la kostoj	<u>542</u>	sumo de la rimedoj	<u>542</u> gld.

B I L A N C O je 1984 - 12 - 31.

<u>Aktivo</u>		<u>Pasivo</u>	
Starigaj kostoj, nete de deprezoj	215	Kotizoj antaŭpagitaj por postaj jaroj	180
Biblioteko, nete de deprezoj	27	Asocia kapitalo	83
		(MALGAJNO) por la jusefiniginta jaro (226)	
		Kreditoroj:	
		Mondk. Eld. Esp.	175
		F-lino Ahmad-Nia	<u>30</u>
aktivo-sumo	<u>242</u>	pasivo-sumo	<u>242</u> gld.

Franz J. Braun,
Prezidanto.

Lawrence Mee,
Kasisto.

IKEF videble vivas !

En Bruĝo ni verkis paĝon por la historilibroj de la E.-Movado.



La manpremo kiu signalis la ekfunkciigon de la vivanta Fakgrupo.



Ĝenerala Sekretario Mee kaj Prezidanto Braun diskutas la agadplanon.

Ambaŭ fotitaj momentoj okazis en la kadro de la 19-a Markola Kongreso, en la malnova kaj tre bela urbo de Bruĝo, en Belgio.

La Kongreso estis brile organizita de S-ro R. Rotsaert, la Sekretario de la Bruĝa Esperantista Grupo, kaj membro de I.K.E.F.

La unua laborkunsido.

La unua Laborkunsido de la Fakgrupo okazis je la 19-a de aprilo, ĉe Bruĝo en Belgio, en la kadro de la 19-a Markola Kongreso. La Prezidanto, S-ro F.J. Braun, kaj la Ĝenerala Sekretario, S-ro L. Mee, pritraktis longantagordon de punktoj ne antaŭe plene traktitaj perletere. Dum parto de la tempo, S-ro R. Rotsaert partoprenis la diskuton, kaj aparte donis valorajn konsilojn pri la laŭjuraj kaj financaj eblecoj malfermaj al unuigoj similaj al la nia.

Rezultoj de la laborkunsido videbliĝos en la paĝoj de la Novajleteroj, de tempo al tempo.

Eblas jam nun raporti la decidon aperigi en la proksima Novajletero formalan vokon al la oficiala fondkunveno dum la Universala Kongreso en Aŭgsburgo.

Formala tagordo estos anoncita, kune kun la nomoj de kandidatoj por elekto.

Ĉar voĉdonrajto klare apartenas nur al Membroj de la Fakgrupo, ni urĝe konsilas al tiuj, ricevantoj de tiu ĉi nuna Novajletero, kiuj ankoraŭ ne formale aliĝis aŭ kiuj ankoraŭ ne aranĝis transpagon de la kotizo por la kuranta jaro, kiel eble plej baldaŭ ordigu la aferon. Ni tamen provos ebligi tujan aliĝon al la Fakgrupo surloke en Aŭgsburgo, antaŭ la adopto de decidoj, por tiuj, kiuj tre lastatempe volas aliĝi.

La desegno por varbfolio por la Fakgrupo ricevis aprobon, post enkonduko de kelkaj ŝanĝoj en vortumado. La ĉefa inter ili estas la enmeto inter la agadpunktoj de instigo al entreprenoj uzi Esperanton por reklamanoncoj en la E-gazetaro kaj ĉefe en revuo MONATO. Tiu varbfolio baldaŭ estos preta por uzado dum lokaj renkontigoj aŭ kongresoj; petu kvanton jam nun kaj estu preta varbi membrojn por ni!

Dum kontrolo de la financa stato de la Fakgrupo, konstatiĝis, ke la 'kurantaj' aferoj iras sufiĉe glate, sed restas la grava

malhelpo de manko de kapitalo.

Ni diskutis la evoluon de la Peradservo proponita en la Novajleteroj, kaj decidis provi plivastigi la ideon per klaraj mencioj de varoj aŭ servoj disponeblaj al Membroj. Estas evidente, ke tia plivastigo dependos je la proponoj de la koncernataj membroj, kaj per tiu ĉi mencio ni invitas klarajn proponojn.

Eble la ĉefa interkonsento de la kunsido estis konstato, ke la plej grava rolo de la Fakgrupo kuŝas en la du interligitaj kampoj de terminologia laboro kaj verkaj eldonado de instru-kaj studlibroj en ekonomia scienco. Plida atento estos donata al tio en estontaj Novajleteroj.

Grandparte, la kunsido okupiĝis pri la proponita Statuto, kaj la rezulto estas kelkaj ŝanĝoj en la teksto.

Ni publikigos la amenditan proponon jam en plena tempo antaŭ la Fondkunveno, sed restas ankoraŭ tempo nun por Membroj mem proponi ŝanĝojn, se necesas. Unuflanke ni deziras, ke la Statuto donu fidindan gvidon dum longa periodo, sed aliflanke ni konstatas, ke kelkloke la unue proponita vortumado suferas pro troa pompeco.

Ĉefe, tiu pompeco kuŝas en la paragrafoj pri regado kaj labormaniero, kaj ni aparte bonvenigus komentojn cele al simpligo de la koncerna teksto.

Ni prenas la nunan okazon ripeti nian esperon, ke jam antaŭ Fondkunveno la Statuto ricevu ĝeneralan akcepton kaj apogon, por ke detala pritrakto dum la Fondkunveno ne prenu valoran tempon.

La Prezidanto petas vin, se vi estas Membro kaj jam nun scias, ke vi ne povos ĉeesti la Fondkunvenon, skribe donu al li la rajton anonci dum la kunveno vian subtenon por la Statuto, kaj citi vian nomon. Eventuale ankaŭ, ke vi pretas akcepti elekton al funkcio, se proponita de alia Membro.

Roterdamo, Lawrence Mee,
1985-04-24. Ĝenerala Sekretario.

INTERKONATIĜO

Kun plezuro ni bonvenigas novajn membrojn al nia membro-listo.

Tiu ĉi listo havas apartan intereson, ĉar en ĝi troviĝas nun kaj la nomon de nia unua Dumviva Membro, S-ro Voit, kaj la nomojn

de S-roj Mboge Mbele kaj Arocha, la unuaj membroj tra la Subtena Fondaĵo.

Ni petas atentigon pri iuj eraroj de detaloj en la listo.

Membro-listo je 1985-04-15.

17. Voit, S-ro Willy, entreprenestro;
Saarbrücker Strasse 2, D-6670 St Ingbert, Okc. Germanio;
18. Mboge Mbele, S-ro Jean-Marie, komerca reprezentanto;
B.P. 1816, Douala, Kameruno;
19. Wiersch, S-ro Hans, fakkonsilisto;
Tilsiter Strasse 39, D-7063 Welzheim, Okc. Germanio;
20. Yamakawa, S-ro Shiuchi, interpretisto kaj tradukisto;
1-3-4 Soka, Soka-shi, Saitama-ken 340, Japanio;
21. Arocha, Ing. José Gabriel, konstruingeniero;
Av. La Fuente, Quinte San José,
San Felipe, Estado Yaracuy, Venezuelo.

Niaj Mecenatoj.

Ni esprimas apartajn dankojn al Membroj, kiuj faris kroman pagon, aŭ por donaci al la ĝenerala kaso aŭ por kontribui al la asocia kapitalo.

Dankon! al:

S-roj Mee, Voit, Polerani,
Wiersch kaj Yamakawa.

La Subtena Fondaĵo de IKEF.

Kandidatoj por membreco, kiuj estas tamen malhelpataj aliĝi pro neebleco transpigi la kotizosumon, sinanoncis al ni el Bolivio, Brazilo, Ĉeĥoslovakio, Ĉinio, Orienta-Germanio, Hungario, Jugoslavio, Pollando kaj Sri-Lanko.

Ni havas fondaĵon celitan helpi en tiaj kazoj, sed provizore tiu kaso estas malplena. Ni bonvenigus viajn donacojn!

-----o-----o00o-----o-----

Interŝanĝo de ideoj.

Ni havas la agrablan taskon fari menciojn pri, kaj etendi dankojn pro, pluraj ricevitaĵoj por nia Biblioteko.

(Parenteze ni rimarkigu la kreskantan bezonon por helpo tiurilate: kvankam la enhavo de la Biblioteko estas ankoraŭ tre modesta, ĝi jam prezentas sufiĉe da materialo taskigi volontulon, kiu havas intereson starigi katalogon, kodigi la erojn laŭ konata klasifikadsistemo, kaj kunmeti regulajn raportojn.)

Ricevita jam komence de la jaro estas la unua kajero de nova revuo el Brazilo. La revuo nomiĝas, Pionira Inform-Bulteno,

kaj unu el la kunredaktoroj estas kontakto nia, S-ro Ruy Albuquerque.

En tiu unua kajero troviĝas tre kontentiga, niaflanke, raporto pri la starigo de nia Fakgrupo, sed pli okulfrapa estas la entuziasmiga raporto pri la kreskado de la E.-Movado en tiu potenca lando en Suda-Ameriko. Ĉefe tiu disvolvo de la internacia lingvo estas ligita kun oficistoj en la Banko de Brazilo; ili ŝajne ĝuas valoran, moralan, subtenadon de la entreprenon mem. Ne surprize, do, la enhavo de la Inform-Bulteno celas kapti la intereson de relative novaj Esperantistoj sed la tuto estas leginda.

Sen ia dubo, la iniciato meritas mal-aran subtenon, kaj ni rekomendas ĝin niaj Membroj.

El Italio ni ricevadas nun la organon la Itala Esperanto-Federacio, en Milano, (kie loĝas nia Membro, D-ro Poler-ri). Parte en la nacia lingvo, ankaŭ ĉi revuo klare celas instigi legant- n aktive partopreni la Movadon.

Aparte leginda en kajero 1 por 1985 estas raporto pro enketo farita inter- gantoj pri la meritoj de la diversaj- orikoj kutimaj kaj dezirataj. Kiel- zerco en la uzado de statistikaj met- oĝi estas, sendube, malpeza, sed- bone prezentita.

Tre okulfrapa estas la broŝuro celanta- logi nin partopreni la 2-an Internacia- taluna-Esperantista-Ferisemajno-n, dum- io. Tuj ni rimarkis, ke la uzata- longigo por la renkontiĝo estas IKEF, tio ne estas kaŭzo por ni re-elpensi- on por nia Fakgrupo.

La programo por la semajno meritas at- tion de Esperantistoj de ĉiuj aĝoj, sed- e promesas la plej multon por tiuj, ĵ estas ankoraŭ junaj en jaroj.

Por la semajno tuj antaŭ tio de IKEF, ricevis inviton partopreni je Inter- tia Renkontiĝo en la urbo Romans, la- l nomata, 'Pordo de Provenco, de la- o, de la maro'. La programo por la- ajno estas senescepte distra kaj kul- iga, kun pluraj ekskurselektoj.

Krome, la vojaĝo inter Romans en Fran- kaj Vilanova en Katalunujo estas- ıla!

De Radio-Polonia, en Varsovio, ni- revis konfirmon de mencioj pri niaj- oroj, dum elsendoj, kune kun sciigon, oraro de elsendoj restos sensange- somera periodo.

De Radio-Vieno ni ricevis sciigon de- so inter gestudentoj ĉe la Ŝtata Kom- a Akademio, en Judenburg, Aŭstrio, kun- ponon, ke ni faru kontakton kun ili. Volonte ni per tiu ĉi mencio invitas- tan respondon cele al daŭra intersang- de ideoj.

Tri malnovaj verkoj de aparta intereso- ni estas donacitaj al la Biblioteko. 'Albanio', eldonita en 1923 de 'Int- acia Komerco', ĉe la adreso de la ti- Esperanto Triumfonta, (nun Heroldo Esperanto), estas mallonga studo pri- komercaj eblecoj kaj industria vivo- tiu, eĉ tiam, ne-bone-konata landeto

en Eŭropo.

La libro, 'Pitman's Commercial Esper- anto', de 1931 estas lernolibro por- anglo-parolantoj, direktita rekte al- tiuj, kiuj volis uzi la lingvon por kom- ercaj rilatoj. La enmetita dek-du-paĝa- vortareto ne pretendas esti kompleta, sed la ordigado laŭ branĉoj de komerco, estas notinda. Aparte interesa ĝuste- nunatempas estas la listo de pli ol ducent- lando-kaj-loko-nomoj, kun klara priskr- ibo de la reguloj por formi derivaĵojn.

En la 'Historio de la Lingvo Esper- anto', de Edmond Privat, (du volumoj, de 1923 kaj 1927), troviĝas multaj aludoj- al uzado de nia lingvo por komercaj- celoj, en la fruaj tagoj de la Movado.

Krom aludoj al la unua Komerca Vort- aro en Esperanto, de Kreuz, (fotokopio de- kiu kuŝas jam en nia Biblioteko), leg- inda estas la raporto pri la 'Internacia- Konferenco por Komuna Komerca Lingvo' en 1923 kaj la 'Konferenco por la uzado de- Esperanto en Komerco kaj Industrio' en 1925, tiu lasta sub la patronado de la- Pariza Komerca Ĉambro. Grandaj estis la- esperoj tiuepoke!

Tute moderna estas la 'Komputada Baza- Terminaro', de Kalckhoff kaj Pick, 1985, (donacita al ni far S-ro Wiersch). Tiu- ĉi kvar-lingva faka terminaro, kun dif- inoj senescepte en la i.l., montras sek- vindan metodon ordigi tian vortaron kaj- kompili indekson. Bedaŭrinde, la enhavo- ne povas simile voki laŭdojn, pro pluraj- mankoj en la elektado de terminoj; ŝaj- nas, ke la kompilintoj apenaŭ konsultis- pli fruajn verkojn en la sama kampo.

Ni ne povas ne senti grandegan domaĝ- on, ke la kompilintoj bazis la tuton sur- miskomprenita baza radiko; ĉu la komput- orfakuloj neniam komprenos, ke oni simple- ne rajtas, en Esperanto, atribui al mal- nova radiko, 'komputi', tute novan kaj- alisencan difinon?

Spaco mankas por tie ĉi aperigi pli- ol simplan mencione de alia leginda lasta- tempa eldonaĵo: Akademiaj Studoj, 1985, de 'Esperanto Press' en Kanado. Du el- la gravaj tie trovitaj artikoloj venis el- la plumo de via Ĝenerala Sekretario, sed- sendube la verko kaptos atenton pli pro- aliaj kontribuoj de Akademianoj kaj aliaj- konataj verkistoj, en tiel diversaj kam- poj kiel per-maŝina-tradukado, pasivaj- participoj, tekstanalizado, vortfarado, kaj topnomiko.